

voko el stirio

Bulteno de la Esperanto-movando en
Stirio kaj de la Esperanto-Societo
"Unueco" Graz



Mitteilungsblatt der Esperanto-
Bewegung der Steiermark und des
Esperanto-Vereins "Einigkeit" Graz

N-ro 375

marto / März 2024

ZVR 47381603

Ĉu ankoraŭ valoras la penon lerni lingvon?



La brazila artikolisto Hélio Schwartzman publikigis en julio 2023 pensigan tekston en la grava ĵurnalo "Folha de S. Paulo", sub la titolo "Ĉu ankoraŭ valoras la penon lerni lingvojn?". Per sagacaj argumentoj, citante esplorojn de fakuloj pri tiu temo, li tute ne menciis Esperanton, sed lasis ideojn, kiuj certe povas interesi parolantojn de la Internacia Lingvo. Ni faru resumon pri liaj ideoj:

- - eble la Artefarita Intelektulo kaŭzos perdon de intereso pri lernado de fremdaj lingvoj, kio estas perdo de bela esprimo de homeco;
- - tamen, plej multaj homoj ne interesiĝas pri profundaj kulturaj gajnoj, sed simple pri banala komunikado, ekzemple por peti lunĉon en lunĉejo;
- - por uzado en ĉiutagaj banalaj situacioj, ne necesas profunde lerni la apartaĵojn de iu lingvo, kaj en tiaj situacioj la novaj teknologioj estas tre utilaj kaj oportunaj;

- - temas do pri speco de "faka" intelekta laboro: lernado de fremda lingvo estas nepre necesa por literaturaj tradukoj kaj por historiistoj kaj filozofoj;
 - - tiu fenomeno ne estas nova: en pasintaj jarcentoj, la lernado de la latina lingvo estis necesa por laŭrajta eniro en la mondon de kulturo, eĉ por sciencistoj;
 - - nuntempe la angla lingvo okupas similan postenon, sed fakulo pri Aristotelo certe devas lerni la grekan;
- Ni Esperantistoj flegas la ideon, ke lernado de lingvoj ne estas nur "utilisma" deziro, sed ambicio pli ampleksa: alproksimigi malsamkulturajn homojn per amikeco kaj iel kontribui al la monda paco, laŭ nia povo. Ĉu tro ambicia celo?

*Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis
Paŭlo S. Viana el Brazilo en Esperanta
retradio.blogspot.com.
<http://aldone.de/retradio>.*



Citaĵoj de la tago

*Mi ĉiam memoras pri artikolo de Profesoro **Humphrey Tonkin**, publikigita antaŭ multaj jaroj, per kiu li rekomendis lernadon de **Esperanto** al la tiel nomataj "triaaĝuloj". Per nia lingvo ili povus trovi amikojn en la tuta mondo, kaj nuntempe, kiam interreto faciligas la komunikon, tio fariĝis eĉ pli vera.*

Laste, mi pensas pri la kritikoj, kiujn oni lastatempe faras al niaj Esperantaj kluboj, kongresoj kaj renkontiĝoj. Mi konsentas, ke oni devas ilin modernigi kaj aktualigi, rilate al novaj teknologioj. Sed mi pli kaj pli konvinkiĝas, ke "homoj kun homoj" devas renkonti sin por ĉirkaŭbrakoj, kisoj, manpremoj kaj ridetoj. Sufiĉas da soleco en nia mondo. Esperanto estu perilo por varmaj personaj kontaktoj.

Paŭlo S. Viana el Brazilo

*en Esperanta retransmisio.blogspot.com,
<http://aldone.de/retransmisio>.*

*

„Oni devas postuli neblan, por atingi la eblan.“


Otto von Bismarck, fondinto kaj unua kanceliero de la Germana imperio

*1815 en Schönhausen (Sachsen-Anhalt)
+1898 en Friedrichsruh (Schleswig-Holstein)

*

„Mi ne komprenas, kial la homoj timas novajn ideojn. Mi timas la malnovajn.“

John Cage. Usona komponisto kaj artisto. Fama pro lia teatraĵo 4'33'' kun la ordono „**Tacet**“, t.e. ili ekzistas el kom-
pleta trankvileco. (*1912 en Los Angeles
+1992 en New York City)



Ĉe kuracisto

Kuracisto: „Mi ne povas kaŝi al vi la fakton, ke vi estas tre malsana homo. Ĉu estas iu, kiun vi deziras ankoraŭ vidi antaŭ via morto?“

„Jes, certe.“

„Kiun do?“

„Alian kuraciston!“

El „Miru, Pensu, Ridu“ de Paŭl Bennemann 1950, Heroldo de Esperanto

*

La vojo

Paciento: Bonan tagon, doktoro.

Kuracisto: Vi malbone vidas, ĉu ne?

Paciento: Kial vi scias tion?

Kuracisto: Vi venis tra la fenestro.

Sendita de Mag. Walter Klag

*

„Unter der kleinsten Steppdeckn kann der größte Depp stecken.“

Bayerische Volksweisheit von Denis Scheck, Leiter des Literaturfestivals Potsdam in einer der letzten Ausgaben der leider abgewürgten „Wiener Zeitung“



Nedezirataj favoratoj

*Karikaturo de Petar Prismetrovic
en „Kleine Zeitung“*


Ni havas novan klubejon kaj Esperanto-broŝuron

Karaj geamikoj,

En lastaj monatoj multe okazis en nia klubo. Antaŭvice mi raportas pri Esperanto-broŝuro, kio estas por Graza kluba mejloŝtono. Do, mi rakontu. La dudek kvaran de oktobro Norina kaj mi povis viziti la ĝeneralan direktoron Dieter Hardt Stremayr. Nia konversacio ĉe li daŭris pli ol du horoj, ĝentile mi adiaŭis de li en espero, ke ili decidus fari ion. Venontan tagon mi ricevis retmesaĝon de Konsortium, ke ili interkonsentas fari la broŝuron por Esperanto.

Kiel mi ricevis tiun ĉi informon mi kontaktiĝis kun nia eminenta klubano kortega konsilisto doktoro Klaus Perko. Kiam li aŭdis de mi ke mi petas lin traduki ĝin, li tute estis entuziasmigita kaj li interkonsentis tuj fari tion. La unua paŝo jam fruktis kaj daŭros kompreneble sian tempon. Intertempe okazis kelkaj renkontiĝoj ĝis kiam ni atingis la celon.

Fin-fine la sesan de la februaro mi tenis la Esperanto-broŝuron en mia mano! En tiu ĉi momento mi estis tiom fiera kaj samtempe feliĉa esti la estro de tiu ĉi Esperanto klubo.



Dankon mi volas esprimi ne nur al niaj klubanoj, sed antaŭvice al sinjoro ĝenerala direktoro Dieter-Hardt Stremayr, kiel ankaŭ al lia sekretarino Schwendenwein!

Nun mi deziras informi vin pri la dua granda paŝo. Ni nun posedas propran Esperanto-klubejon, ankaŭ permesu al mi raportu kune kun mia estimata amiko Heinz-Paul Kovaĉic. Mi vizitis kun Heinz registraron en urba domo kie troviĝas la sidejo de urbestriko de Graz. Ni renkontis tie Mag. Georg Fuchs gazetara proparolanto de urbestriko Elke Kahr.

Por momento urbestriko salutis nin mallonge. Ĉirkaŭ unu horo daŭris nia diskuto. Oni komencis serĉi en la urba registaro ejon por nia Esperanto-klubo. Do, post unu semajno mi kaj Heinz povis rigardi la novan klubejon en Lagergasse 98a. Kiel mi vidis la ejon mi tre ege estis ĝojegita. En sekvanta konveno ni ĉion priparolis kaj kaj decidis: JES. Nun ni posedas la unuan Esperanto-klubejon tut-aŭstrie. Tio estas unika sukceso, permesu al mi kiel estro de Esperanto-klubo Graz dankon diri al la urba registaro pro ilia grandioza subteno kiel de la urbestriko Elke Kahr. Mi volas aliĝi al bondeziroj ke ŝi ricevis premion World Major Prize por la plej bona urbestriko de la tuta mondo.

Per tiu mi finas mian raporton kaj invitas lunde la kvaran de marto al Lagergasse 98a al la nova klubejo. Ĝojas je granda partopreno.

*Ewald kaj la estraro de la Esperanto-klubo
Graz.* ./.

Esperanto Societo Stirio

Esperanto – Gesellschaft – Steiermark



kultur.raum graz im Volkshaus Lagergasse 98a, 8020 Graz



Ankaŭ la komunuma konsilantaro Elke Heinrichs portas nian E-korsaĵon.

Klubvesperoj

en la **Volkshaus** Lagergasse 98a



La planitaj tagoj de niaj klubvesperoj en nia nova klubejo estas la unua **lundo** de la monato je la **19-a** horo:

4-a de marto: Philipp prezentas la skizon de nia nova ĉefpaĝo kaj ni ankaŭ povas diskuti la venontan agadon.

Pliaj klubvesperoj je la **8-a** de aprilo, **6-a** de majo kaj **3-a** de junio.


Vi ankaŭ atingas la Volkshaus kun la tramo 5 kaj aŭtobuso n-ro 66 haltejo Karlauergürtel (ĉe XXXlutz). Krome ekzistas sufiĉaj parkejoj.

Grava termino ankaŭ estos, ke de la vendredo **15-a** de marto ĝis la **17-a Praga** grupo vizitos nin, kaj ni bonvenigos vendrede je la **19-a** kaj duono en la ĉefstacidomo.

La **16-an** de marto ni planas gazetaran konferencon sur la terasa kafejo de Kastner kaj Öhler kun niaj pragaj gastoj,

Ni ĝojegas vidi vin en malnova vicleco!

Sincere salutas vin Ewald.



Loriot, naskita kiel Bernhard-Viktor Christoph-Karl von Bülow 1923-2011



* Impressum *



Mitteilungsblatt des Grazer Esperanto-Vereines Esperanto-Societo Stirio „UNUECO“

Für den Inhalt verantwortlich:
Dr. Heinz-Paul Kovacic

Panoramagasse 3, 8010, Graz
Tel. 0664 3264027

heinz-paul.kovacic@aon.at

		botelo
		bottle bouteille
		fles bottiglia
		Flasche botella
		flaske garrafa
		flaska пляшка
		pullo butelka
		üveg flaša

GERMANGLO

(Sprich: Dschörmänglou)

*In alter Zeit ging man adrett,
zückt's Portemonnaie, kauft' ein Billett,
vergaß auch nicht den Parapluie,
aß á la carte ein grand Menue.
Man saß auf einem Kanapee
und wohnte an der Waldchaussee.*

*Französisch sprach man ja so gern;
denn dieses galt nur als modern.
Wer wollt' schon ungebildet sein?
Nur deutsch zu reden, war nicht fein.
Das ist nun völlig anders heute,
denn Englisch sprechen alle Leute.*

*Der Dancing-room, der Swimming-pool,
das Hobby auch ist wonderful !
Man mixt die Drinks, man ist kein Snob,
man knuspert Toasts und kauft im Shop.
Man trägt im Partner-Look Blue Jeans,
kauft Singles sich mit Evergreens.*

*Man geht zu Party und Weekend,
man managt mit dem Börsentrend,
man macht sich fit mit Sprays und Creams,
man fährt zum Job und workt in Teams.
Man lauscht den Hits und Songs der Stars,
man hockt mit Darlings in den Bars.
Die Pipeline bringt das Oil herbei,
es spielt die Band, der Sekt ist dry.
Man bringt zum City-Wash den Blazer.
Und in der Zeitung liest der Leser
Vom Open-Air-Festival
mit Rock und Beat am Weserwall.*

*So übernimmt man fremde Muster.
Wann wird der Deutsche sprachbewusster?*

*Snackt Platt mit den, de dat versteht !
Sprecht DEUTSCH zu Deutschen weit und breit !
Warum im Ausland radebrechen ?
Man sollte ESPERANTO sprechen !*


Günther Peek, Nienburg (ca. 1990)

Krucenigmo

kun du kaŝitaj proverboj de Stano Marček

	LA UNUA KASITA PRO- VERBO	SUBSTAN- TIVA FINAJO	AŬTO- SIMBOLO DE DAN- LANDO	GRANDA ARBARA BEST		PROFITO, BON- EPIKO	FADEN IRANTA EL MJELO	LA DUA KASITA PRO- VERBO
INTER- PLEKTU ŜNOROJN						NUME- RALO HIDRO- KARBIDO		
ADVERBA FINAJO		STULTI- EGUL- „MURJO“ DE KUBO						
TUTE PROK- SIME			DIREKTU AŬTON IDENTE, SIMILE					
VENINTA PENS, KONCEPT				NOMO DE EDISON SPIRITA ATMOSFERO				
GRANDA MUZIKA INSTRU- MENTO							SIMB. DE FOSFORO KAPL- TALISTA	
ETA REM- SIPO							SIMB. DE BARIO TEA KAFEINO	
KUŬREJA AKRA- GUSTA BULBO						FINGRA ALMET SPECO DE KAMBIO		
TUNO		BONDORA REMA KOMBINAJO MANCEBLA KARNY						
PRA- PATR			PARIGI OROLORA VERKAD, ESTIGAD					
HINDA SEKTAN				MEM- BRAR PART DE HISTO				
ERODITA KALK- ROKO								NULO ERC. MINEJ
FEMAL- ETO							INTERNE LINSULOJ EN DEZERTO	
LIRIKA POEMAR						BELA IN- TERARANG NEIDEN TIFIKITAJ OBJEKTOJ		
TARO (MAL- LONGIGO)		DONI, DEDICI RAPIDE MOVIGUS						
NUME- RALO			EGA MAL- RIĈEC DIFINITAJ OKAZAJOJ					
MALANĈA PART DE LA KOLO				HAM. UNU- OKAZE MONATO				
TEATRAJ VERKOJ								SIMBOLO DE KALIO KOMENCI
SAGACAJ ARTI- FIKAJ							MAL- GRANDIGA SUTRISO KONJUN- KCIO	
ALTAJ LUD- KARTOJ						MEMORATA NUMERALO ROMANE 500		
SIMBOLO DE SULFURO		TIROL KANTIS						

Lingvaj baroj en sciencaj publikaĵoj



FAPESP, grava brazila fondaĵo apoganta sciencajn esplorojn, publikigis en novembro 2023 bone dokumentitan artikolon pri lingvaj baroj en scienca komunikado. Ĉi tiu temo aparte interesas Esperantistojn. Temas pri la malavantaĝoj de sciencistoj, kiuj ne havas la anglan kiel sian unuan lingvon.

Teamo de esploristoj el dek landoj analizis la kriteriojn por publikigo en pli ol 700 revuoj de biologiaj sciencoj. Ĉar la angla lingvo estas la plej uzata en scienco, ofte la eldonistoj sugestas al aŭtoroj, ke ili dungu servojn de tradukado kaj reviziado de siaj artikoloj, por garantii, ke la enhavo estas esprimita klare kaj ĝuste laŭ la normoj de la angla lingvo. Tio konsiderinde plialtigas la kostojn de la publikigo.

Krome, el tiuj centoj da revuoj, nur du (*Nature kaj Nature Plants*) deklaris tute klare, ke artikolo ne estus rifuzita nur pro la fakto, ke la uzado de la angla lingvo en ĝi ne estas kontentiga. Kaj nur 6 procentoj el ili ordonis al la reviziistoj, ke ili ne rifuzu artikolojn en la angla lingvo nur pro gramatikaj problemoj. Kaj nur 1 procento el la revuoj proponis senpagan helpon por la redaktado de la koncernaj tekstoj. Unu brita revuo pri Ekologio disponigas


senpagan servon per Artefarita Intelektto por reviziado de publikigitaj tekstoj.

Unu brazila sciencisto el la urbo Recife, en ŝtato Pernambuco asertis, ke fakaj revuoj estas fontoj de lingvaj baroj, kaj devus helpi aŭtorojn alfronti ilin. Li esprimis la senton de maljusteco kaj diskriminacio en la kriterioj de la revuoj, kiam ili rifuzas artikolojn verkitajn en malbona angla lingvo. En simila maniero, japana aŭtoro raportis siajn malfacilaĵojn produkti sciencajn artikolojn kaj prelegojn en Britujo kaj Aŭstralio: “Mi bezonas longan tempon kaj penigan klopodadon por ĉion plenumi en la angla. Lingvaj baroj estigas ansion, malkomforton, honton. Necesas kuraĝo por alfronti ilin. La mondo bezonas kontribuojn de ĉiuj sciencistoj, sendepende de la regado de la angla lingvo.”

Lastatempe, korektado de sciencaj tekstoj per Artefarita Intelektto estas pli kaj pli ofte plenumata. Por parolantoj de Esperanto, tamen, la vera solvo troviĝas en alia koncepto pri lingvaj baroj en la mondo.

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis
Paŭlo S. Viana el Brazilo
en Esperanta retradio.blogspot.com,
<http://aldone.de/retradio>.

La grafika gesto de Ludoviko Zamenhof



Grafologio estas konsiderita "pseŭdoscienco", t.e. "instruaro aŭ praktikado sen sciencaj bazoj aŭ sen scienca rigoro". Oni faras la grafologian studon sur la formo de la literoj, kaj ne sur la teksto.

Tiu formo, ankaŭ konsiderante la ligojn inter la literoj, ilian rilatan grandecon en lineo ktp., donas informojn pri la psikologiaj trajtoj de la skribanto.

La bazoj de grafologio ne estas tute neraciaj, kiel tiuj de astrologio, sed mankas sciencaj pruvoj por apogi ĝiajn konkludojn. Malgraŭ tio, multaj entre-prenoj kaj firmaoj uzas ĝin por elekti dungotojn. Specife rilate al la skribo de Zamenhof oni povus iom ŝerce diri: "Tre ofte estas vere malfacile kompreni lian skribmanieron kaj tio pruvas, ke li estis kuracisto: medicinaj receptoj ja ĉiam aspektas nekomprenblaj!".

Sed pli serioze, jen grafika analizo fare de Alga Vanna Guernieri, konata itala grafoanalisto, de letero de Zamenhof, kiun mi transkribis per klaraj literoj kaj enmetis ĉi suben.

Ŝi estas sekvanto de la grafologia metodo, prilaborita de Girolamo Moretti (1879-1963), skolfondinto en Italujo de originala tekniko de esploro de personeco, kiu per atenta analizo de la grafika gesto, sukcesas

spuri la plej kaŝitajn kialojn, kun iliaj plej profundaj signifoj, kiuj kaŭzas la geston mem.

La analizo de tiu ĉi unua letero, el la jaro 1906, indikas, ke Zamenhof estas persono eksterordinare sentema, akceptema kaj pro tio ankaŭ facile reagokapabla al instigoj. Esence lia inteligenteco estas sagaca, emocie movita de profunda sento kaj granda amo por la homaj estaĵoj (la proksimaj kaj la tuta homaro). Li havas rimarkindajn memoron kaj kapablon asimili kaj lerni.

Tamen tio ĉio postulas grandan investon de energioj, des pli, ke li nepre ne kontentiĝas pri la unuaj kontentigaj rezultoj. Persisto, forta volo kaj laboremo permesas al Zamenhof elteni la streĉadon necesan por atingi la plej ambiciajn celojn.

Oni scias, ke li estis pasia fumanto kaj ke plurfoje provis ĉesigi fumadon, sed sensukcese.

La skriba gesto en tiu ĉi letero klare montras simptomojn de fizika sufero kaŭzita de la kora malsano, kiu la 14-an de aprilo 1917 mortigis nian majstron.

Tiu-ĉi sonartikolo estis skribita de Gian Piero Savio el Israleo en Esperanta retradio.blogspot.com.

<http://aldone.de/retadio>.